

1. Aŭtuno ĉe la maro

Estas aŭtuno ĉe la maro. Juna virino iras sur vojeto. Ŝi rigardas al la maro. Estas nuba vetero, kaj ŝi estas sola. Ŝi haltas, rigardas al la maro, pensas kaj iras plu sur la vojeto. La aŭtuna maro estas griza.

La nomo de la virino estas Katrina. La maro plaĉas al Katrina. Ŝi rigardas al ĝi kaj pensas pri somero, pri vojaĝoj, pri foraj landoj. Katrina volas vojaĝi. En somero ŝi ofte vojaĝas. Sed nun estas aŭtuno, la suno ne brilas, la nuboj kaj la maro estas grizaj. Estas aŭtuno, kaj Katrina nun ne povas vojaĝi. Aŭtune ŝi devas labori.

Ŝi iras plu, haltas kaj pensas. Ŝi estas sola. Ne plaĉas al ŝi esti sola. Ŝi volas vojaĝi kun amiko. Sed nun tio ne eblas.

Sur la maro iras ŝipo. Ĝi estas granda ŝipo kun multaj homoj. Ili vojaĝas al alia lando. Ne al fora lando, sed al alia. La ŝipo iras al Danio. Katrina volas somere vojaĝi per ŝipo al Danio. Danio plaĉas al ŝi. De Danio ŝi povas vojaĝi plu al Germanio. Ankaŭ Germanio plaĉas al ŝi. Sed nun ŝi devas labori en Svedio. Nun ŝi ne povas ŝipvojaĝi.

En Germanio estas amikoj de Katrina. Ŝi nun pensas pri ili. Eble ili pensas pri ŝi – eble ne. Ŝi ne scias. Ili estas someraj amikoj. En somero ŝi povas vojaĝi al ili. En aŭtuno ne. Somere ŝi estas kun bonaj amikoj, sed aŭtune ŝi estas sola. Katrina rigardas al la griza maro kaj pensas pri la amikoj.

Nun ŝi parolas al la maro. “Mi volas vojaĝi”, ŝi diras al ĝi. “Mi volas iri al foraj landoj.” Sed la maro ne respondas. Ĝi silentas. Ne, ĝi ne silentas, sed ĝi ne parolas al ŝi.

Katrina ne plu rigardas al la maro. Ŝi iras for de ĝi. Ŝi ne plu volas pensi pri somero kaj vojaĝoj. Nun ŝi volas pensi pri aŭtuno kaj laboro. Plaĉas al ŝi pensi pri la laboro. Ĝi estas bona laboro, kaj ĝi plaĉas al ŝi. Sed somero kaj vojaĝoj pli plaĉas al ŝi.

Glosoj: esperante / *angle* / *japane*

(Literoj ^A-^F montras oftecon de la radiko; ^A – plej ofta, ^F – plej malofta.)

aŭtun-e ^B en aŭtuno / *in the autumn* / 秋に

aŭtuno ^B sezono post somero / *autumn, fall* / 秋

Danio lando inter Svedio kaj Germanio / *Denmark* /

デンマーク

dano ^F ano de nordeŭropa nacio inter Svedio kaj Germanio /

Dane / デンマーク人

for-a ^B malproksima / distant / 離れた

Germanio lando inter Pollando kaj Nederlando / *Germany* / ドイツ

germano ^C ano de granda eŭropa nacio inter Pollando kaj Neder-

lando / *German* / ドイツ人

griza ^C koloro inter nigra kaj blanka / *grey* / 灰色の

somer-e ^C en somero / *in summer* / 夏に

Svedio lando inter Norvegio kaj Finnlando / *Sweden* /

スウェーデン

svedo ^C ano de nordeŭropa nacio inter Norvegio kaj Finnlando /

Swede / スウェーデン人

ŝip-vojaĝi ^{1B3} vojaĝi per ŝipo / *travel by ship* / 船旅をする